


**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Kováts

Kunlaborantoj:

Jennifer Bishop

Stefan MacGill

Mauro La Torre

Blazio Vaha

ENHAVO

<i>Al lingva demokratio</i> (alvoko).....	1
Ralf Gion FRÖHLICH-Katalin KOVÁTS: <i>Edukado.net</i>	2
Stephan MACGILL: <i>Potenco al la lernanto</i>	5
Jekaterina IGNATIEVA: <i>Ideoj kaj proponoj pri Interkulturo</i>	8
Stephan kaj Hajnal MACGILL: <i>Krioj sur deklivoj (IK 2001)</i>	12
Mauro LA TORRE: <i>(Duon)tago de la Lernejo 2001</i>	14
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (AL, AU, BR, FR, JP, US).....	16
<i>Konferencaj aferoj</i>	22
<i>[Konferenca raporto]</i> (Jennifer BISHOP).....	22
<i>Rezolucio de la 35-a ILEI-Konferenco</i>	25
<i>Financa rezulto, donacintoj</i> (Boo Mee KIM-LINDBLOM).....	26
<i>Personaj impresoj pri la 35-a Konferenco</i> (Rob MOERBEEK).....	26
<i>Niaj novaj estraranoj</i> (<i>Biografioj de EMANUELSSON, PETROVIC', TRENNER</i>).....	31
<i>Grava anonco al la legantoj, redakciaj informoj</i>	34
<i>Aliĝilo por la 36-a Konferenco en Brazilo</i>	35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio.
Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673.
<m.latorre@uniroma3.it>; <http://lps.uniroma3.it>
Kunordigado, rilatoj kun E-organizoj.

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario.
Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>
Eldona agado (inkl. periodaĵojn).

Sekretario: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150)52387 kaj (+46)708152387 (mesaĝoj)
<agneta.emmanuelsson@liberal.se>
Membraro, sekcioj, komitato.

Vicsekretario: Sabine Trenner [loĝeja adreso pro baldaŭa translokiĝo ne indas esti donata] Retadreso: <trine@snafu.de>
Rilatoj kun lernejoj, trejnado, junularaj aranĝoj.

Estrarano pri financoj: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Estrarano: Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio.
Tel./fakso (+61 3) 9818 7358, fakso: (+61 3) 9905 3668.
<esperanto@education.monash.edu.au>

Konferencoj, rilatoj kun FIPLV.

Estrarano: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Čačak, Jugoslavio.
Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101
<radp@ptt.yu>

Lernejaj projektoj, universitata agado.

AL LINGVA DEMOKRATIO! ALVOKO AL LA MEMBROJ DE UEA/TEJO/ILEI

Karaj membroj (kaj ne-membroj) de UEA/TEJO/ILEI,
dum la Universala Kongreso en Zagrebo la komitato de UEA aprobis novan labor-planon kaj komisiis nin esti speco de "garantia komisiono", kiu certigos, ke la labor-plano estos kunlabore plenumata de la membroj de niaj tri organizadoj.

La nova labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:

- informado
- instruado
- utiligado
- plijuniĝo
- tutmondiĝo
- profesiiĝo

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas komprenataj.

Ĉu ni bezonis novan labor-planon komence de la 3-a jarmilo? La respondo estas, laŭ ni, jes! Sekve de tio, kion ni ĉiuj faris sub la flago de la "Kampanjo 2000", ni nun devas turni nian atenton al la stato de Esperanto en la mondo, kaj **reiĝi movado**, kiu parolas al la mondo, en maniero, kiun la mondo komprenas (**informado**), kiu instruas la lingvon kaj la movadon ankaŭ per la lastaj metodoj kaj teknikaj rimedoj (**instruado**), kiu utiligas Esperanton por la normalaj bezonoj de la vivo (**utiligado**).

Tiaj agadoj estu farataj kun atento al la junularo, esperantista kaj neesperantista, al la tuta dimensio de nia agado (por ke ne restu landoj sen esperantistoj) kaj al la uzado de la profesiaj talentoj de niaj membroj.

Unu lasta afero devas esti klara al ĉiuj: ni ne bezonas konkurenci kaj batali inter ni. Ni estas ĉiuj laborantoj por la sama idealo preter kelkfoje tro rigidaj asociaj limoj. La labor-plano, kiun vi legos, emfazas la rolon kaj de UEA kaj de TEJO kaj de ILEI, kaj de ĉiuj aliaj esperantistaj

asocioj, kaj ni ŝatus en ĉiuj landoj vidi kunlaboron, eĉ se kun la bezonata memstareco de ĉiu organizaĵo.

Ankaŭ la titolo de ĉi tiu komunikado kaj de la laborplano "*Al lingva demokratio!*" ne bezonas klarigon. Ĝi tre klare diras, kiu estas la finfina celo de nia laboro.

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA

Holger Boos, prezidanto de TEJO

Maŭro La Torre, prezidanto de ILEI

Ralf Gion Fröhlich – Katalin Kováts:

Edukado.net

nova projekto por praktikantaj instruistoj

Interreto estiĝis grava ilo por esperantistoj. Ĝi faciligas rapidan, tutmondan komunikadon, tiel ke diasporaj esperantistoj dise en la mondo facile povas kunligiĝi kaj estiĝi parto de lingva komunumo. Bona instruado estas kondiĉo por ke tiu lingvokomunumo, de plejparte nedenaskaj lingvanoj, kresku kaj prosperu. La usona Esperanta Scienca Fondajo (Esperantic Studies Foundation, www.esperantic.org) tial iniciatis la kreadon de la interreta servo, *edukado.net*, kiu subtenas instruistojn kaj lernantojn de esperanto. Edukado.net konsistus el tri partoj: *katalogo de lerniloj*, *lernilteko* kaj *pedagogia informejo*.

Unue lanĉiĝas en novembro 2001 la **katalogo de lerniloj**. Ĝi estos datumbazo de ĉiuj gravaj lerniloj de esperanto, printitaj, vidbendaj kaj digitalaj. La lerniloj estos serĉeblaj laŭ diversaj kriterioj kaj ŝlosilvortoj pere de interreta serĉilo en la hejmpaĝo: www.edukado.net. La kriterioj temas ekz. pri la nivelo de instruado, la aĝogrupoj de lernantoj, la fontolingvo de la instruilo, la pritraktataj temoj ktp. (Vidu la ĉefpunktojn artikolfine!) Tiel ekzemple instruisto kiu serĉas lernilon por vortprovizo por plenkreskuloj je meza instrunivelo trovos la korespondan lernilon ĉe *edukado.net*.

La listo de lerniloj estas farata post zorga analizo kaj ĉiu lernilo prezentigas kun informoj pri formato, enhavo, metodo, nivelo, aspekto kaj komento de instruisto. Fine de la redaktora analizo ĉiu uzanto povas aldoni proprajn komentojn kaj rekomendojn rilate al la lernilo. Tiel aliaj instruistoj kaj lernantoj povas utiligi la spertojn de la aliaj kaj lerni de ili. La servo ebligas al la uzantoj ankaŭ aldoni informojn pri novaj lerniloj por aktualigi la datumbazon. Tuj post redaktora kontrolo la nove aldonitaj informoj estas publike alireblaj por ĉiuj uzantoj. La katalogo provos doni liston pri la plej grandaj libroservoj kie la lerniloj aĉeteblas kaj indiki la tieajn aktualajn prezojn, por ebligi al la serĉantoj ne nur infomiĝi sed poste ankaŭ povi rapide akiri la elektitan ilon.

Se la unua etapo, nome la katalogo, havas intereson kaj sukceson, en 2002 ESF pretas subteni la kompletigon de *edukado.net* per la du aliaj partoj: *lernilteko* aŭ tujeldonejo kaj *pedagogia informejo*.

La **lernilteko** ebligas facilan interŝanĝon de ekzercaroj kiujn verkis instruistoj mem. Ili povas esti sendependaj paĝoj traktantaj diversajn gramatikajn, leksikajn, ktp. temojn aŭ povas esti komp-

letigaj materialoj kaj ekzercaroj al konkretaj lerniloj kaj rekte uzeblaj kun tiuj. Ni planas kolekti ankaŭ testaron kaj kontrolmaterialojn (kun solvoj). La uzantoj de la lernilteko povos mem sendi siajn digitalajn lernilojn (ekzemple kiel Word-dokumenton) al la datumbazo kie tiuj katalogiĝas kaj estos elsuĉeblaj digitale denove de ajna alia uzanto. Do ĉiuj uzantoj povos suĉi el la datumbazo ekzakte tiujn ekzercarojn kiujn ili bezonas kaj tuj uzi aŭ adapti por sia laboro. Tiel ŝpariĝos miloj da laborhoroj por instruistoj kiuj ne plu devos konstrui por ĉiu situacio proprajn ekzercarojn.

La **pedagogia informejo** entenas plejparte informojn pri la internaciaj ekzamenoj kaj anonctabulon en kiu aliaj kursoj povas esti anoncigitaj. Same kursorganizantoj povas serĉi instruistojn per anonco kaj instruistoj povas oferti siajn servojn al organizantoj.

Ĉiuj servoj estas senkostaj. La projekta realigo estas farata de entrepreno en Berlino, kun la jenaj teamanoj:
– *Katalin Kováts (Smidéliusz)*: pedagogia kaj enhava redaktado;
– *Håkan Lundberg*: teknika gvidado, programado, publikaj rilatoj;

- *Mihil Meenwissen*: evoluigo de la datumbazo, programado;
- *Nastja Kojevnikova*: grafika aspektigo;
- *Ralf Gion Fröhlich*: konceptigo, projekta gvidado, publikaj rilatoj.

En la nuna unua fazo de la laboro la redaktanto de la katalogo bezonas informojn pri la plej sukcesaj kaj bone uzeblaj lerniloj internaciaj, sed pli grave pri la eksterlande malpli konataj nacilingvaj iloj. Pro tio ni petas la kolegojn kaj verkintojn de lerniloj helpi nin esti bone informitaj kaj sugesti al ni tiajn lernilojn, eventuale sendi ekzempleron (kiu post la analizo ni povos ĉe resendi al la sendinto). La lernilteko bezonos ĉe pli da aktiva kontribuo flanke de la esperanto-instruistaro, sed la

teamanoj tre esperas, ke nek la intereso nek la kontribuemo mankos kaj tiel nia mondskala reto ekhavas bone uzeblan kaj utilan, modernan datumbazon.

Kun ideoj kaj sugestoj por la katalogo bonvolu kontakti Katalin je la adreso: katalin@ikso.net, pri aliaj demandoj eblas kontaktiĝi kun Ralf, ĉe la berlina entrepreno:

Hesselbom Berlin GmbH,
Wichertstr. 46, DE-10439 Berlin,
 tel. +49 30 440 360 30,
hesselbom@t-online.de

Instruado de esperanto estas la bazo por la kresko de la lingvo. *Edukado.net* estas servo kiu faciligas la laboron de instruistoj klopodantaj plej bone instrui esperanton.

Esperantic Studies Foundation

Formularo por la Katalogo traktas la sekvajn ĉef-punktojn:

Bibliografiaj notoj:

Aŭtoro(j):
 Titolo:
 Subtitolo:
 Eldonejo, eldonjaro:
 ISDN-numero:
 Aĉetebleco, prezo:
 Tipo de instruilo:

Nivelo:
 Aldonaj materialoj:
 Celgrupo:
 Aĝgrupo:

Strukturo:

Enkonduko:
 Enhavo:

Nombro de la unuoj:
 Longeco de unuopaj unuoj:
 Vortlisto:
 Gramatikaj resumoj:
 Solvoj por la ekzercoj:
 Indekso:

Konstruo de unu leciono:

Teksto:
 Bildo pri leciono:
 Ekzercoj:
 Gramatikajoj:
 Demandoj:
 Aldonaĵoj:

Enhavo de la tekstoj:

Tipo de tekstoj:
 Kulturaj konoj pri E-o:
 Interkulturaj temoj:

Metodo:

Ekstera formato, aspekto:

Mezuro de la ilo:
 Paĝnumeroj, longeco:
 Koloreco:
 Ilustrajoj:
 Legebleco:
 Kunligmaniero:
 Ĝenerala aspekto:
 Bildo:

Ĝenerale pri la ilo:

Aperintaj recenzoj:
 Opinioj en kelkaj vortoj:

Stefan MacGill Potenco al la lernanto

En klasĉambra situacio, la instruisto povas decidi, ĉu la lern-procezo estos instruisto-centra aŭ lernanto-centra. Plej ofte, la instruisto decidas kiel prezenti la lingvon, per kiuj metodoj kaj teknikoj, kaj en kiu vicordo. La uzotaj lerniloj povas influi tion; ankaŭ la maniero en kiu la instruisto mem lernis Esperanton, aŭ ricevis sian instru-trejnadon, aŭ en kazo de instru-anto, en la maniero laŭ kiu tiu estis instruita pri kio ajn.

Ni pensu ĉefe pri la vicordigo de la instruajoj. Tradiciaj Esperantaj

lerniloj, du-lingvaj kaj gramatike bazitaj, kutime transprenis la vicordon uzata por instrui la koncernan nacian lingvon (la fonto-lingvon) aŭ aliajn fremdajn lingvojn, manke de klara ordo por Esperanto (la cel-lingvo). Tio neglektis la fakton, ke tiuj etnaj lingvoj enhavas multajn pene traktendajn gramatikajojn, kiuj en Esperanto estas facile klarigeblaj per kelkaj linioj da klarigo aŭ konvenaj ekzemploj. Aliflanke, la unike malfacilaj punktoj de Esperanto ne estis sufiĉe traktitaj de tiuj nacilingvaj paradigmoj.

La apero de rekt-metoda instruado, kaj specife la Cseh-metoda instruado, ŝanĝis tion. Tio portis gravajn antaŭpaŝojn. La gramatiko estis analizita el Esperanta vidpunkto. Ĝi estas apartigita en serion de malgrandaj unuope digesteblaj lerntaskoj, aranĝeblaj ŝtupe kaj sprite prezentitaj. Ĉiu estis instruebla en Esperanto mem, per paroligaj ekzemplaj frazoj, sen eksplicita gramatika klarigo.

Kaj tamen, en retrospektivo, ne ĉio perfektis. La gramatiko, kvankam maleksplicita, regis super konsideroj pri komunika utilo; kial unu homo serioze informus alian, ke leono estas besto? Estas ja vere, ke la komunikaj utiloj por Esperanto diferencas al tiuj de grandaj naciaj lingvoj, kaj pli parencas, sed ne identas, kun tiuj de minacataj minoritataj lingvoj. La okazoj peti de fremdulo surstrate direktojn, aŭ fari modbutikajn aĉetojn estas malpli utiligeblaj en Esperanto ol angle, hispane, japane. Tamen, niaj kursoj emfazu ne nur la gramatikajn unikajojn de Esperanto, sed ankaŭ ĝiajn unikajn komunikajn situaciojn (anstataŭ la menciitaj situacioj, ekzemple, oni elektus la vojon por ekskurso en ILEI-konferenco, aĉetus en kongresa libro-servo).

Sed pli grave, pri la vicordo de la instrueroj. Kvankam Cseh rezistis la verkadon de lernolibroj, liaj abundaj kursoj por instruistoj firmigis unu vicordigon de la instrutemoj. Tiom sukcesa estis lia agado, ke tiu vicordo iĝis gravurita en marmoro tra kvindeko da jaroj, kvazaŭ la ordo sola kaj sankta, verŝajne kontraŭ la deziro kaj imago de Cseh mem. Generacioj da lernolibroj poste aperintaj, eĉ tute ne Cseh-metodaj, tamen alprenis kaj helpis eternigi ĝian ja tro verbo-malcentran ordigon.

Naciaj lingvoj havas klarajn vicordigojn de la materialo, devigataj pro la komplikaj kaj esceptoj kiuj plagas eĉ (eble foje precipe) iliajn komencajn nivelojn (Ju pli baza estas verbo, des pli malregula ĝia formado!). Esperanto povus liberigi sin el tiu vicordiga tiranajo. Ĝia gramatiko estas tiom efike dispartigebla kaj senescepta, ke eblus konstrui preskaŭ senfinan nombron da defendeblaj ordigoj, komencante el ajnaj, eĉ kuriozaj ekiroj, ekz. "Mi fermis la butikon. La butiko estas fermita." aŭ "La bebo sidas. Mi sidigas ĝin."

Niaj rimedoj pretigi lernolibrojn estas limigitaj (eĉ pli la lernantoj por aĉeti ilin!) do la plimulto de tiuj eblaj vicordigoj restis – ĝis

nun – apenaŭ esploritaj. Sed ni survojas al nova revolucio, inaŭguritaj per komputilaj kursoj. Tio transdonos la potencon for de la instruisto (aŭ kursplaninto) al la lernanto. Tie, la gramatikaj brikoj povas esti organizitaj laŭ rekomendata vicordigo (aŭ eĉ laŭ serio de rekomendoj), sed per hipersaltoj, la lernantoj povos vagi libere inter la temoj, elektante siajn proprajn preferatajn vicordigojn. Se unu lernbriko postulas komprenon de alia, necesas atentigi pri tio kaj proponi salt-inviton.

Kiam la tuta gramatiko estos priskribita per serio da interligitaj temoj, esporeblaj per enhavtabelo, alfabeto indkso aŭ serĉiloj, tio estas nur la komenco! Tio formos universale uzeblan bazon, kiu povos kuŝi sub preskaŭ ajna enhava tavolo. La enhavaj situacioj povas esti dialogoj, lego-tekstoj, serio-rakontoj, ekzercoj, ludoj, pri-movadaj aŭ grand-mondaj, leĝeraj aŭ seriozaj, faktaj aŭ fikciaj, por-infanaĵaj, por-distraĵaj, por-studaj. Ĉiuj kun sono, bildoj kaj movbildoj, kaj eblo registri sian propran voĉon kaj kompari ĝin, po-pece, kun la kursa modelo. Tiu ajntema, ajnspeca enhavo povas ekzisti paralele kaj intime ligita al la gramatiko. Novaj enhavoj ĉiam ajn kreeblas (eble de

diversaj aŭtoroj) kaj aldoneblas al la bazo. Ĉiu vorto, ĉiu segmento (fraz-parto) de la legaĵo povas ricevi tradukon, kaj gramatikan klarigon kun invito salti por pliaj klarigoj aŭ uzekzemploj. Lernanto mem elektos, ĉu sisteme esplori tra la gramatiko, ĉu prefere legi, aŭskulti kaj ekzerci la dialogojn, frandante el la gramatikaj menuoj nur laŭ bezono kaj deziro.

Tio starigas al ni defion krei novspecajn instru-gramatikojn, kiuj ne estas linearaj aŭ unu-ŝtupaj, sed du-dimensiaj kaj mult-ŝtupaj, kun ellaboro de la plej utilaj ligoj inter la gramatikaj brikoj (nek inundo, nek magro!). Ĉiu unuopa briko devos esti kiel eble plej memstara, kun koncizaj klarigoj pri ĝiaj rilatoj al la ligataj brikoj. Ĉi tiu aliro permesas kreon de kromaj brikoj laŭ komunikaj bezonoj, kiuj ne estas strikte gramatikaj, sed etendiĝas trans gramatikaj kategorioj, ekzemple briko pri tempo kunigus la verbo-tempojn (-as, -is, -os), adverbojn (eterne, momente, ofte, foje, rare...), numerojn, adjektivojn (frua, rapida, urĝa...), substantivojn (horloĝo, montrilo, horaro, tagoj, monatoj...) korelativojn (iam, tiam, kiam...) kaj prepoziciojn (dum, antaŭ, post, inter). Briko pri aparteno kunigus ĉiun praktikan rimedon esprimi apar-

tenon, kaj ampleksus seson da gramatikaj kategorioj (tio estas mia, tio apartenas la mi, la aŭto de la bakisto, lia aŭto, mi havas tion, mi posedas tion, tio ne mankas al mi...)

Presita lernolibro ne povus permesi al si la lukson ripeti plurfoje tian materialon en diversaj kuntekstoj kaj kategorioj, sur kompakta disko aŭ en komputilo, tiu limigo jam malaperas.

Certe restos rolo por vivantaj instruistoj kaj ĉeestaj kursoj, kun siaj unikaj etosoj kaj grupa dinamiko. Vivaj kursoj gravas

ankaŭ por tiuj, kiuj plenumas parton de la lernado komputile. Komputila lingvo-lernado jam furoras por naciaj lingvoj. Esperanto faris kelkajn bravajn komencpaŝojn. Estos tempo plonĝi pli kuraĝe en ĉi tiun kampon. Transformiĝos ne nur la liveraj meĥanismoj, sed ankaŭ la maniero en kiu ni konceptas kaj prezentas nian propran gramatikon. La kurs-kreanto vere ĉesos esti instruisto kaj ekestos lernigisto. En elekto de la lernaja vicordo kaj stud-preferoj, la potenco transiras al la lernanto!

Jekaterina Ignatieva

IDEOJ KAJ PROPONOJ PRI INTERKULTURO

La ĉi-somera ILEI-konferenco, okazinta en la urbo Lovran (Kroatio), kolektis internacian teamon de E-instruantoj el ĉiuj eblaj mondopartoj. El ĉiuj ideoj, pritraktitaj dum ĉi-aranĝo, mi ŝatus aparte turni vian atenton al tiuj pri la projekto "Interkulturo".

"Interkulturo" enhavas tre gravan trajton: ĝi celas ne simple instruadon de la internacia lingvo al diverslandaj infanoj, ĝi celas PERE de Esperanto eduki partoprenantojn pri interkulturaj rilatoj kaj komunikado. Tiu

vorteto "PERE" estas esenca: Interkulturo estas projekto, kiu praktike montras socian utilecon de Esperanto. Oni ne plu bezonas nur per vortoj persvadi aliajn, ke Esperanto estas utila, oni povas prezenti tion.

La unuaj du jaroj de la evoluo de "Interkulturo" rezultigis tre sukcesaj:

Al la projekto aliĝis 97 klasoj el ĉiuj kontinentoj, la reta lernejo "Tibor Sekelj" funkcias kaj prezentas al interesigantoj informon pri la partoprenantaj klasoj, enre-

tigitan aron de infanaj laboraĵoj, diskutsalonoj por instruistoj, instruprogramaron kaj krome aliron al multaj utilaj informofontoj kaj retpaĝoj.

La ĉefa aktivajo de partoprenantoj de "Interkulturo" konsistis en korespondado kun klasoj-partneroj el aliaj landoj. Aktivajo interesa kaj utila, sed tamen iom "virtuala". Infanoj, kiel oni scias, pli ŝatas praktikan agadon, agadon videblan, "palpeblan"...

Rezulte, post oficiala prezento de "Interkulturo", kiun Maŭro la Torre faris al la konferencanoj, okazis cerbumado pri novaj ideoj por la projekto en eta, sed tamen internacia grupo. La celo estis elpensi aktivajojn, kiuj:

- 1) pliintensigos kontaktojn inter klasoj-partoprenantoj,
- 2) estos realigeblaj surloke.

Kaj la liston de elpensitaj aktivajoj mi prezentas ĉi-sube:

a) reciproka esplorado:

celo: edukiĝi interkulture; partoprenantoj: ajnaj klasoj, prefere en paroj; instruistoj de la klasoj; kunordiganto: la instruistoj de ambaŭ klasoj

ŝtupo 1. Oni demandas al la lernantoj de ambaŭ klasoj (eblas surloke, sub gvido de la instruisto), kion ili scias pri la lando de kiu venas la amika klaso. Infanoj libere elparolas ĉion, diskutas unu kun la alia, ktp. Poste ĉiujn eldiritajn respondojn (en skriba formo) la instruisto kolektas kaj gardas ĉe si ĝis la fino de la eksperimento.

ŝtupo 2. Infanoj verkas iuspecajn rakontojn pri diversaj temoj, koncerne sian landon: (ekz. "Nia plej granda nacia festo", "Interesaj faktoj pri mia urbo", ktp), poste tiujn rakontojn ili sendas al alia klaso. Krome, lernantoj pretigas la liston de demandoj pri sia lando, kaj ankaŭ tiun ili sendas al siaj amikoj el alia klaso.

Tasko de lernantoj estas serĉi respondojn al tiuj demandoj (eblas kun helpo de instruisto, ekz. oni povas peti al instruistino de historio rakonti ion pri iu elektita lando, pri ties kutimoj kaj gravaj historiaj faktoj). La leterojn, kiujn skribis aliaj infanoj, oni certe legu (ĉu kune, ĉu individue).

ŝtupo 3. En iu fiksita dato (ekz. 3 monatojn post la tago, kiam okazis ŝtupo 1, la instruisto denove demandas al la infanoj,

kion nun ili scias pri la lando, el kiu venas iliaj eksterlandaj amikoj. Tasko de la instruisto estas kolekti la venantajn respondojn kaj poste kune kun la infanoj kompari tiujn respondojn kun tiuj, kiujn la infanoj donis kelkajn monatojn antaŭe.

b) fotoekspozicio

celo: amikigo de infanoj, pli proksima konatiĝo, amuziĝo; partoprenantoj: ĉiuj klasoj, laŭeble grupigitaj en parojn; kunordigantoj: instruistoj

Dek lernantoj el klaso 1 metas en reton siajn fotojn. Poste ili sendas al alia klaso mempriskribojn de homoj, kies fotoj estas en la reto. (Ekz: mi estas ...a, tre ŝatas ... kaj ne ŝatas..., ktp., ktp.) Tasko de infanoj de klaso 2 estas diveni, kiu foto kongruas kun kiu priskribo. Poste ili eventuale informas la klason 1, kiumaniere ili kunmetis foton kun priskribo kaj poste komparas la ĝustecon de siaj respondoj.

Kaze, ke ambaŭ klasoj kaj metas siajn fotojn, kaj divenas "kiu estas kio" pri infanoj el la alia klaso, eblas organizi konkurson: "Kiu estas pli divenema". Tiukaze ekz. ĉiu aparta infano provas mem diveni kiu foto apartenas al kiu priskribo. La

gajninto (en klaso 1) estos elektita fare de klaso 2 laŭ la ĝusteco de respondoj kaj povas eventuale ricevi etan premion de tiu klaso.

* tiu konkurso povas funkcii ne nur pere de reto, sed ankaŭ pere de poŝto.

c) tago de la lando, celo: interkultura edukado; partoprenantoj: ĉiuj dezirantoj; kunordigantoj: instruistoj

Inter ĉiuj klasoj estas elektita unu (aŭ, kaze ke en tiu lando estas kelkaj klasoj-partoprenantoj de la projekto, kelkaj klasoj), "tago" de kies lando oni intencas organizi. Estas fiksata aparta semajno, ene de kiu okazos la aranĝo.

"Tago de Lando" povas okazi en ajna formo: oni povas ekz. mem kuiri kaj gustumigi al ĉiuj iun nacian manĝaĵon de tiu lando, aŭ kune kanti la naciajn kantojn, eventuale porti iujn naciajn vestojn aŭ eĉ havi lecionojn de geografio, historio, kulturo, matematiko kaj kompreneble lingvo, dediĉita al tiu lando.

Ekzistu kelkmonata preparperiodo por la aranĝo. Dum tiu periodo la infanoj devas elekti formon de la festo kaj pretigi ĝin pere de la helpo de lernantoj el la elektita lando. Ĉi-lastaj devas roli

kiel konsultantoj: ili ekz. povas retroŝti (aŭ enretigi, aŭ simple poŝti) al la aliaj infanoj receptojn (eble eĉ kun kelkaj klarigaj desegnaĵoj) de siaj naciaj pladoj, tekstojn de naciaj kantoj (eblas ankaŭ surpaperigi, enretigi melodiojn, – ja ekzistas tute bona noralfabeto por tio), priskribojn de siaj naciaj kostumoj; sendi sian alfabeton kun priskriboj, kiel oni povas legi literojn, ktp.. Do, ili devas reagi al ajnaj demandoj, venantaj de lernantoj el la alia lando.

Post preparo dum anticipe fiksita semajno, ĉiu klaso okazigas ĉe si apartan feston. Impresojn oni poste disdividu kaj komparu perrete (perpoŝte) kun ĉiuj aliaj, kiuj okazigis similan feston.

5) babilejo de infanoj: provizore pri iu aparta temo

6) ludi naciajn ludojn en reto

7) kvizojn pri aparta lando: iu klaso pretigas la demandoliston, ĉiuj aliaj lernantoj provas respondi kaj poste sendas la ĝustajn respondojn al la klaso-organizanto. La gajninto povas ricevi iun premieton.

8) Virtuala Lingva Festivalo en la Kvazaŭna lernejo "Tibor Sekelj":

Ĉiu klaso prezentas en la virtuala ekspoziciejo sian etnan lingvon laŭ elementoj pri kiuj interkonsentos la instruistoj.

Jen fino de la listo.

La proponitaj aktivaj povas pliintensigi la aktivecon de la partoprenantaj lernejoj. Kompreneble, ke ĉiuj de ili bezonas aktivajn agojn ankaŭ flanke de instruistoj kaj gvidantoj de la projekto.

Necesas multe labori por aktivigi jam aliĝintajn kla-sojn kaj varbi al la projekto novajn.. Sed ĉio estas realigebla!

En multaj lingvoj estas proverbo "Okuloj timas, sed manoj faras": la laboro pri "Interkulturo" postulos fortojn, paciencon, entuziasmon, sed ĝi estas farebla, kaj des pli farenda. Kaj mi esperas, ke multaj el Esperanto-instruistoj komprenos la gravecon kaj perspektivojn de "Interkulturo" kaj mem aktive involviĝos en la laboron: ĉu kiel ideodonantoj, ĉu kiel realigantoj.

Jekaterina Ignatieva, Rusio
<katido@mac.com>

Stefan kaj Hajnal MacGill
Internacia Infana Kongreseto 2001

Krioj sur deklivoj

Kvindek ses infanaj vocoj sufiĉis laŭte proklami la grandecon de la Infana Kongreseto okazinta samtempe kun la Universala Kongreso en Zagrebo. La infanoj pasigis semajnon en Grad Mladih (Infana Urbo) sur la herbejaj kaj arbaraj deklivoj de la Ursa Monto. La fortoj de la kvin gvidantoj kune kun simila nombro de helpantoj estis streĉitaj provizi buntan programon por okupi kaj kontentigi ĉiun, precipe pro la tre (tro?) granda aĝgamo. Tamen, bunto kaj abundo estis: grupo lernis nodojn kaj konstruis arbo-kabanon, alia flugigis kajtojn, alia modelumis el argilo, aliaj konstruis pupojn post spektado de pupteatro, iuj kantis, pliaj kunmetis bidajn kolĉenojn. Vesti sin per kimono estis ebleco, kiel ankaŭ pluki florojn kaj pretigi bildojn el la petaloj. Varmaj posttagmezoj pleniĝis per laŭstadia freneza olimpiado, trezor-sercado, drako-ĉasado, mini-golfo kaj aliaj sportaĵoj. Vesperojn okupis magia spektaklo de Trixini, rostado de cilindro-panoj ĉe komuna fajro kaj adiaŭa koncerto por kiu multaj pretigis erojn.

Surfote: 56 infanoj el 14 landoj, jen la plej amase ĉeestata IIK de la lastaj 23 jaroj, sub prizorgo de nur 5 gvidantoj kaj kelkaj helpantoj.



Ekskursoj gvidis la gregon al UK, al etnografia kaj teknika muzeoj kaj al cikonia vilaĝo.

La infanoj venis el dekkvino da landoj, do la lingva diverseco multis. La duono regis nian lingvon denaske aŭ simile, pli ol kvarono povis adekvate paroli, nur ĉe malmultaj mankis sufiĉa parolkapablo.

Sufiĉe da oficiala raportado, ni aŭdu unu voĉon (9-jaran) el la monto-flanko, per starigo de la kutima [por ne diri ŝablona] demando "Kion vi ŝatis pri la IIK?". Respondo: "Mi povis ludi kun la katoj, kaj estis multa libera tempo. Tamen estis multaj programoj kaj bonaj konkursoj, estis bone fari bildojn el florpetaloj kiujn ni mem kolektis, manlaboroj estis bonaj – la argilaj figuroj, ni ŝatis prepari skeĉojn, estis bona la paraŝuta ludo... mi ne ŝatis la ekskursojn ĉar devis iri longe en busoj kaj multe promeni [fakte, mallonge kaj malmulte, tamen...] Neniam per buso... per trajno, aŭ aviadilo aŭ pramo, io ajn sed ne buse. Estis bone esti en grupo [kun samaĝaj knabinoj]. La grandaj knaboj ne tro ĝenis nin." La ceteraj kvindek kvin sendube havas proprajn prijuĝojn, sed kiel tiom da deklivaj krioj prezenti?

Surfote: infanoj el Kroatio, Hungario kaj Japanio surterigis la ferocan drakon, kiu laŭdire venis el Francio.



Maŭro La Torre (DUON)TAGO DE LA LERNEJO 2001

Ankaŭ ĉi-jare en Zagrebo, dum la Universala Kongreso de Esperanto, okazis la tradicia programero, nomata *Tago de la Lernejo*. Fakte la "tago" daŭris nur 4 horojn (9h-13h), kio en si mem povas ŝajni multo; sed – kompare kun la aro de la intervenintoj kaj alparolemuloj – tio estis tre malvasta vesto, kiel spertis la ĉeestintoj.

Pri kio temis? La diskutitaj temoj estis sinsekve kvar:

1. INTERKULTURA EDUKADO
2. EKSTERLERNEJAJ SPERTOJ
3. LA KROATA INSTRUSISTEMO
4. INSTRUISTA TREJNADO, EKZAMENOJ, INSTRUSCIENCA ESPLORADO
5. KUNLABOREBLO (de ILEI) KUN ALIAJ ORGANIZOJ

Dum la unua matenduono oni raportis, diskutis kaj bilancis pri la unua konkludiĝanta jardujo de **Projekto INTERKULTURO** (*IK*).

Relative multaj instruistoj (el RO, US, HR, IT, BE, FR, PL), partoprenintaj en la projekto *IK* kun siaj lernejoj klasoj, intervenis, rakontante sian sperton kaj priajn problemojn. La projektestro Maŭro La Torre, kunlabore kun la nova fakulo pri lernejoj projektoj Radojica Petrovic', enkondukis la diskuton per skemo de atentindaj pli-malpli problemaj aspektoj. Montriĝis plusoj kaj minusoj, plu analizotaj dum la ILEI-konferenco, okazinta tuj post la UKE, en Lovrano.

Ni aŭdis ankaŭ pri la eduka "eksperimento" Eu[^]roskola, el la voĉoj de la kontribuinta lernejo Gabrielo Corsetti kaj de la kunordiginta instruistino Claude Nourmont. Temas pri pasintjara projekto, en kies kadro aro da liceaj klasoj vizitis la Eŭropunian Parlamenton, tie debatante per la Internacia Lingvo pri la komunikadaj problemoj en la parlamento mem. Sume pri la tuta fenomenaro, kiun ni grupigis sub la kupola titolo "interkultura edukado", kolektiĝis multaj interesaj informoj, sed bedaŭ[^]rinde malsufiĉis la tempo por vera pridiskutado.

La kolegara simpozio estis tiam interrompita de gaja vizito, fare de la ekkursantoj el la **IIK (Internacia Infana Kongreseto)**, kiuj prezentis

spektaĵojn, fruktojn de sia dumsemajna laborado. Ilia interveno simbole specimenis la populacion de la alcelatoj de niaj projektoj!

Sekvis la kontribuoj pri tri aliaj realigataj projektoj, kiuj, kvankam striktasence ne-lernejaj, povas diversmaniere interesi la Esperanto-instruulojn.

Hokan Lundberg (TEJO-estrarano) prezentis la konstruatan retejon **EDUKADO.NET**, kie, kun la subteno de **ESF** (Esperantic Study Foundation) kaj la kunlaboro de ILEI, oni disponigos servojn utilajn por la instruantoj: aŭtomate konsultebla katalogo de lerniloj, informaro pri E-ekzamenoj, renkontejo de instruemuloj kaj kursorganizantoj, ktp.

Sonja Petrovic' ilustris la monde disvastiĝantan aranĝon de **Lingvaj Festivaloj**. En tiaj eventoj, organizataj diversloke de esperantistoj (nun precipe el TEJO), oni prezentas al ĝenerala publiko grandan aron da diversaj lingvoj, parte sinsekve kaj parte samtempe, kun la ĉefa celo, vekti kaj nutri la lingvan intereson. Ofte temas ankaŭ pri maltre konataj lingvoj (cigana, hebrea, sanskrita, ĉuvaŝa, samea, ...), prezentataj malakademie, per paroladoj, kantoj, bildoj, skemoj, fare de denaskuloj aŭ fakuloj.

Atilio Orellana Rojas raportis pri la nuna stato de la konata aranĝo **Indiĝenaj Dialogoj**, kiu celas alproprigi al la estroj de organizaĵoj de "indiĝenaj" popoloj la kapablojn uzi komunikrimedojn lingvajn (Esperanto) kaj teknikajn (Interreto) por la internacia kunlaborado.

Simile, kiel okazas ĉiujare, la instruisto (kaj ILEI-sekciestro) Ivan Bekavac-Basic' konigis al la ĉeestantoj la strukturon de la instrusistemo de la gastiganta lando Kroatoj.

Fine mallonge alparolis la (nepaŭzintan) aŭskultantaron pluraj instru-fakuloj kaj asociestroj pri **instruistaj problemoj kaj realigoj**, el profesia kaj organiza vidpunktoj. Pri la universitata laboro koncerne la trejnadon de Esperanto-instruistoj intervenis Ilona Koutny (Poznan'o) kaj Ivan Bujdosó (Budapeŝto). Pri la ecoj de niaj ekzamenaj sistemoj alparolis Bill Maxey (IEK) kaj Yamasaki Seiko (JEI). Pri la kunlabor-ebloj de ILEI kun ceteraj E-organizaĵoj kontribuis Renato Corsetti (UEA), Sjoerd Bosga (TEJO), Helmar Frank (AIS).

Entute eble 200 instruistoj kaj instru-interesatoj streĉe ĉeestis la lernejan matenon, kiu dezirinde venontjare reiĝos vera tago (kun meza paŭzo!), partoprenante panoraman revuadon pri la Esperanto-lern(ej)ado en la nuntempa mondo.

Albanio

La albana sekcio havas novan retadreson: selimib@albmail.com. Antaŭ nelonge nia ILEI-sekcio kunfandiĝis kun la Albana Esperanto - Instituto, kies direktoro estis s-ro Doc. Vasil Pistoli. Tiu Instituto estas jure agnoskita. La komuna nomo restas Albana Esperanto-Instituto, la adreso plu restas la sama (vidu K4); tel. mia +355 4 238 558, tiu de Vasil 241. Direktoro de Instituto estas elektita Vasil Pistoli; sekretario Bardhyl Selimi; kasisto Rita Permeti.

Bardhyl Selimi

Aŭstralio

Somerlernejo „vintre” ☺

La 18a Aŭstralio Esperanto Somerlernejo okazos en PERTH (Perto) Okcidenta Aŭstralio en 2002, januaro 5-18. Informoj: www.iexpress.net.au/~esperanto.

Oni povas peti "Somerlernejan Broŝuron" ĉe : *The Esperanto League of WA, 33 Moore Street, East Perth 6004, W. AUSTRALIA.*

La Somerlernejo proponas kvar instrunivelojn, de *Nivelo 1* (veraj komencantoj) ĝis *Nivelo 4* (altnivelaj Esperantistoj). Unu el la kursoj je Nivelo 1 estos instruata per la Cseh metodo; tiun kurson gvidos S-ro Atilio Orellana Rojas. Ĉiun post-tagmezon okazos Cseh-Seminarioj; Atilio kaj S-ino Jennifer Bishop helpas instruantojn kiuj deziras atingi la Cseh Diplomon pri instrukapablo.

SinJORINO Penny Vos daŭre instruas E-on ĉe la Treetops Montessori School (Arbopintoj Montessori Lernejo), kaj ŝi tre ĝuas la entuziasmon de la lernantoj, stabanoj kaj gepatroj. Penny ĵus verkis "Proponon pri Esperanto" kiun ŝi intencas prezenti al la Ŝtata Edukada Departemento. Ĝi enhavas ideojn pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn; kaj ŝi skizas la avantaĝojn kaj al lernantoj kaj al instruistoj.

Trifoje la programo por talentaj infanoj (PEAC) provizis la ŝancon por Esperanto esti proponata kiel mallonga kurso. Pro la peto de la PEAC estro, la kurso estis kombino de lingvo kaj arto (60/40) prezentata de Trish O'Connor, arta instruistino kaj esperanta studento. Ĉiu el la 16 PEAC lernantoj aĝaj inter 8 ĝis 12 jaroj prezentis apartan landon, kiun ili esploris dum 8 semajnoj. Dum tiu periodo ili sufiĉe lernis Esperanton por traduki siajn esplorojn kaj montri ilin per kreema maniero. La rezultoj

ampleksis de mirinda totema stango pri Kanado ĝis fromaĝ-aspekta moviĝa pendaĵo pri Svisio. Ili kune kompletigis gigantan mondan puzzleon, etikedigis siajn landojn de esploro, kalkulis la sumon de la loĝantoj kaj listigis la nombron de parolataj lingvoj. Post kiam la kurso finiĝis, la bezono por lingvo kiel Esperanto estis klara al ili!

Ankaŭ universitataj edukadaj organizoj estas subtenantaj la lingvon per la produktado de 8-programoj TAFE (universitata branĉo) Televida kurso, "Esperanto por Novlernantoj" por spektantoj en Okcidenta Aŭstralio. Aldone, la Universitato de Okcidenta Aŭstralio patronos la Pertan Esperantan Somerlernejon per reklamado pri ĝi en sia somera kursa programo.

S-ino Trish O'CONNOR (Perto, Okcident-Aŭstralio)

Brazilo

Entuziasmo kaj multo

- > *Kiom da kursanoj vi kutimas, deziras?*
- >> *Nu, kutime dek, sed dudeko dezirindas.*
- > *Sed ni jam havas dudek ses. Ĉu ni malakceptu ses?*
- >> *Ne, sed ni fiksi limon je tridek.*

Jen fragmento el la ret-mesaĝado prepare al gvido de kvar-taga instruista seminario organizita kadre de la 37a Brazila Kongreso de Esperanto (Brazilio, 15-20 julio). Tio aŭguris memorindan aranĝon, ĉar en la trejn-programoj de ILEI, oni ne kutimas renkonti tioman partopren-deziron. Temis ne nur pri kvanto, sed ankaŭ kvalito. Sendiskute oni tie akceptas la indon de paroliga, komunik-centra instruado; la instruantoj pretis vigle diskuti, partopreni, kaj volontuli sin por rol-ludado (el kio ni malkovris verajn talentulojn).

Aperas 'instruantoj' en la antaŭa frazo kaj ne 'instruistoj' ĉar el la trideko, nur kvin estas profesiaj instruistoj kaj nur du estas dungitaj instrui Esperanton. Tion spite svarmon da leĝoj federaciaj kaj provincaj, subtenantaj la instruadon de Esperanto. La instruantoj (aŭ -ontoj) ĉefe aktivos en E-klubo aŭ libervolaj lernejoj rondo.

La kongreso mem altiris pli ol 500 aliĝintojn, el kiuj pli ol tricent sukcesis partopreni. El tiuj, plene triono estis junuloj, por kiuj BEJO organizis paralelan kaj buŝitan programon. Vigla salonpleno da etuloj

kompletigis la aĝ-gamon, ĉar tie okazis ankaŭ infana kongreseto. La rasa kaj aĝa vario estas al alikontinentano rimarkinda.

Same salutinda estis konstati kiel edukado ne restis flanka aŭ niĉa afero. Pluraj kunsidoj de la kongreso traktis edukajn temojn, kaj BEL klare volas multon atingi sur tiu tereno. Dum fak-kunsido, konkretaj planoj naskiĝis vastigi la estraron kaj agadon de la ILEI-sekcio, ke ĝi povu arigi ĉiujn instruantojn kaj -istojn konataj al BEL. Aperis ankaŭ indaj eldonprojektoj, pri kies ekzisto oni ne scias ekster la lando. Oni multe diskutis kiel pli efike eluzi la eblecojn de la favoraj leĝoj, kaj kiel protekti la kelkajn ekzistantajn oficialigajn atingojn.

Nun la kluboj kaj klasoj rekomenciĝas dise tra tiu vasta lando. Se la instruantoj forportis kaj transdonos la sciojn, ideojn kaj teknikojn kiujn ili spertis kaj interŝanĝis, kun la julia viglo kaj entuziasmo, certe la septembro de iliaj kursanoj buntos kaj indos.

Stefan MacGill, Hungario



Francio

Internacia Infanrenkonto en Grésillon

En la kastelo «Grésillon- Baugé» (departemento Maine et Loire), post kelkaj jaroj da silento pro renovigo kaŭze de interna sekuro restariĝis la internaciaj infanrenkontoj dum la Paskaj Ferioj 2001. Tiu renkonto okazis en la kastelo proksime de la urbo «Angers» de la 14a ĝis 21a de aprilo 2001 kie kuniĝis 27 infanoj kaj adoleskoj francaj kaj ukrainaj, kun 9 plenkreskaj prizorgantoj.

Tiu renkonto estis pli modesta ol la antaŭaj (kiel la lasta dum 1996 kun 64 infanoj ĉeestintaj). Ĉiuj partoprenantoj parolis esperanton, ĉu komencantoj, ĉu praktikantoj, inter ili troviĝis eĉ denaskaj esperantistoj.

La programo de la semajno estis varia:

- La matenoj estis ĝenerale rezervitaj por la lernado de la internacia lingvo, pere de diversnivelaĵoj kaj ludoj, kantoj, skeĉoj... kaj dum la paska mateno, la infanoj partoprenis en ludo cele al serĉado de ĉokolado en la parko de la kastelo.

- La posttagmezoj estis dediĉitaj al promenadoj organizitaj por permesi al ĉiuj la malkovron de la ĉirkaŭaĵoj: vizitoj de la urbo «Saumur», de la muzeo en «Baugé», de la kastelo de «Lude», de la cervbredado. Pikniko en arbaro kun serĉado de trezoro ebligis malkovron de la naturo. Tiom da okazoj por pli riĉigi sian vortprovizon kaj firmigi la kunlaboron por la sukceso de sia skipo.

- La vesperoj ebligis la prezenton de kantoj kaj ludoj, aŭ elmontron de kaŝitaj talentoj (muziko-magio-teatro).

Tiu infanrenkonto, organizita je la iniciativo de Elizabeth BARBAY prezidantino de «Bondy-esperanto» apud Parizo, kontentigis la kunpartoprenantojn. Ĝi ne povus okazi sen la monhelpo de la «Grupo de la Geinstruistaj Edukistoj=Groupe des Enseignants Esperantophones», kaj nek sen la sindonemo de Paulette NAULET, Juanita Turbillon kaj la kunlaboro de la bonfarantaj homoj kiuj meritas plej korajn dankojn.

Ekde nun, ĉiuj kunhelpantoj devas sin prepari por la venonta jaro ĉar jam demandoj alvenas.

J. CATIL resumis el franca teksto de Elizabeth BARBAY

Japanio

Hejmpaĝo de japana mezlernejo en Esperanto

Mezlernejo Kigaku, Iwate, Japanio, havas sian retpaĝon en Esperanto: <http://www.rnac.ne.jp/~kigaku/jkigaku.htm>.

En la lernejo lernas 14 geknaboj, de 13 ĝis 16 jaraĝaj. La lernejo petas sendi kuraĝigajn leterojn al la lernantoj.

Usono

Jarraporto 2000-2001

A) Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE)

Dum la pasinta jaro la prezidanto de AAIE, Ronald Glossop, kompilis kaj disdonis adres-liston de niaj pagintaj membroj, kiuj la 6-an de majo nombris 40, 17 el kiuj nun instruas profesie, kaj 11 el kiuj estas pensiitaj instruistoj. Ĉiu AAIE-ano estas aŭtomate ano de ILEI, ĉar parton de ĉies AAIE-kotizo nia kasisto plu-sendas kiel ILEI-kotizon. Kaj por krome subteni ILEI-on, kaj ĉar multaj pagas post januaro, ni ĉi-jare pagis al ILEI kotizojn por 60.

Ĉe nia jarkunsido la pasintan majon, ni elektis novan vicprezidanton, Phil Dorcas, kiu lastatempe verkis kaj disdonis al ĉiu AAIE-ano detalan, inform-riĉan raporton de sia unua Esperanto-klaso.

Laŭ nia Eduka Sekretario, Kent Jones, dum la lerneja jaro 2000-2001, 798 homoj inter la aĝo de 5 kaj 73 lernis Esperanton en 33 grupoj en hejmoj kaj publikaj kaj privataj lernejoj. Nia prezidanto observis ke la plej fruktodonaj lokoj por Esperanto-instruado en Usono nuntempe estas ĉe specialaj programoj en lernejoj post la ordinaraĵoj kaj dum la semajnfino; kaj ankaŭ inter gepatroj kiuj hejme instruas siajn gefilojn.

Per la kvaronjara *Bulteno de AAIE*, kiujn mi redaktas ekde 1974, la AAIE membroj ricevas informojn pri lernejoj kiuj volas korespondi, pri interesaj instru-metodoj kaj materialoj, pri eventoj kiuj interesas instruistojn, pri aktualaj Esperanto-klasoj, k.t.p. Dum la pasinta jaro ILEI sendis sian organon *Internacia Pedagogia Revuo* rekte al ĉiu AAIE-ano, sed la lasta numero (2/01) atingis min en fasko kaj do estis poŝtita kun la junia AAIE-Bulteno.

Multo pri la instruado de Esperanto en Usono okazas ekster AAIE, kiu ideale devus fari multon pli; ekzemple:

- 1) Allogi al AAIE-membreco ĉiujn Usonanojn kiuj instruas E-on
- 2) Instigi ĉiujn AAIE-anojn kleriĝi almenaŭ ĝis sukceso en nia Duagrada Ekzameno
- 3) Organizati instru-materialojn laŭ la aĝo de lernantoj
- 4) Sufiĉe ofte aranĝi staĝojn kaj seminariojn por instruistoj
- 5) Seriozi pripensi pri postuloj por plenrajtigataj instruistoj de E-o en Usono
- 6) Proponi helpon al la diversaj Esperanto-retkursoj

B. Ekster AAIE

La kutima somera Esperanto-kursaro en San Francisko ĉi-jare okazis la unuajn du semajnojn de julio en malsama loko (la Universitato de San Francisko) dum du semajnoj (anstataŭ tri) kaj nun nomiĝas „Nord-Amerika Somera Kursaro” (NASK). Kiel kutime, gvidis ĝin teamo de elstaraj instruistoj: Grant Goodall, lingvistika profesoro el la Universitato de Teksaso en El Paso; Duncan Charters, profesoro de la hispana kaj de rajtigo de instruistoj de fremdaj lingvoj; kaj Derek Roff, estro de komputoraj lerno-materialoj por fremdaj lingvoj ĉe la Universitato de New Mexico.

Kvar nivelojn de perkorespondaj kursoj de la Esperanto-Ligo por Nord-Amerika partoprenas nun entute 159 homoj, 7 el kiuj aliĝis ĉi-jare. Nur unu finstudis. Kvankam eble kelkcent partoprenas per-retajn Esperanto-kursojn, statistikoj tiurilate mankas.

Per la Usona Ekzamena Servo, sub la aŭspicio de AAIE kaj ELNA, la pasintan jaron sukcesis en la Baza Ekzameno 3 homoj; per la Duagrada, 6; kaj per la Supera Ekzameno, 4. La ekzamenoj estas parte en la angla lingvo kaj povas esti administrataj ie ajn kie troviĝas fidinda instruisto aŭ Esperantisto. Pasintjare oni ofertis ilin ankaŭ ĉe la somera Esperanto-kursaro en San Francisko kaj ĉe la ELNA kongreso.

Elstara pri-instruada evento en Usono estis la kolokvo kiu okazis aprile en Vaŝingtono DC sub la aŭspicio de la fondaĵo pri Esperanto-Studoj (Esperantic Studies Foundation). Partoprenis ĝin dudeko da edukistoj el Usono kaj eksterlando, inkluzive antaŭajn kaj nunajn anojn de AAIE

Duncan Charters, Ellen Eddy, Grant Goodall, Bill Maxey, kaj Derek Roff. Dum la kolokvo oni ellaboris planojn kaj asignis taskojn pri la jenaj rubrikoj:

- 1) Klasĉambra instruado
- 2) Semajnfinaj intensaj kursoj
- 3) Familioj, hejmedukado
- 4) Telelernado
- 5) Uzado de Esperanto

*S-ino Doroteo Holland
Usona Sekciestro de ILEI*

Konferencaj aferoj

35a ILEI-Konferenco, Lovran, Kroatio, 28/07-04/08/01

Ŝanĝi la lokon de Konferenco post publikigi la aliĝilon ne estis facila decido sed bonege respogulis la emon de la estraro ne starigi ĉefe ripozigan eventon eĉ post la rigoraj postuloj de UK sed krei agrablan laboreman etoson. Multaj ideoj kaj proponoj jam kolektitaj dum la jaro kaj dum UK pritraktendas dum la sola kunsidaro de la komitato dum la jaro. Pro tio ni troviĝis en la eleganta Hotelo Bristol, Lovran kun ĉiuj kondiĉoj inkluzive klimatizadon en la salonoj kaj la necesajn ekipaĵojn por serioza konferenco. Tamen alveninte konstateblis ke troviĝas ankaŭ multaj allogaĵoj de jam de longe establita marripozejo kiuj aparte kontentigis akompanantojn, ekz. bela promenadejo kaj ĉiuvespera dancmuziko sur la teraso. Ankaŭ la kunlaborantoj povis trovi tempon dum duonhora paŭzo rapide kaj refreŝige sin bani plonĝante rekte de la rokforma promenejo en la kristalklaran akvon de la Adriatika maro. La nuraj malagrablaĵoj estis por kelkaj la ekstrema malseka varmego kaj por ni ĉiuj la fakto ke duono de la ĉeestantoj devis ne nur dormi sed ankaŭ manĝi en aparta loĝejo, kio iom prokrastigis programerojn. Tamen, almenaŭ por la lasta festomanĝo tio solviĝis kaj ĉiuj tre ĝuis finan regalplenon kuneston.

Preninte konsilon de Viŝnja Brankoviĉ de la dungita vojaĝagentejo Orbis Pictus kiu elektis la konferencejon, la programo komenciĝis frue je la 9-a horo, eĉ pli frue por la estraro, kaj finiĝis plejofte je la 23-a sed

provizante 3-horan paŭzon dum la sunbruliga tagmezo. Pro kompreneblaj devoj de niaj ŝarĝitaj prezidantoj dediĉi kelkan someran tempon al sia familio, necesis enmeti multajn gravajn programerojn en la unuajn tri tagojn. Tamen tio tute ne malvalorigas la tempon post la ekskurso kiun la partoprenantoj avide pasigis ĉe laborgrupoj kaj aŭskultante ege interesajn prelegojn de spertuloj en tre diversaj kampoj.

Entute partoprenis 57 personoj el 20 landoj kaj okazis interalie 4 estrarkunsidoj kaj 5 komitatataj kunsidoj. Prezidanto Maŭro la Torre komencis per oficiala bonvenigo en la granda salono, 'Karlo Muhar', (bonega Esperanto-instruisto en porblindula lernejo en Zagrebo). En ĉi tiu salono okazis poste pliaj ĉefaj elementoj. En la alia salono 'Bozidar Vancik' (sperta kursgvidanto, verkinto de fama lernolibro eldonita de "Skolska Knjiga") gvidis Atilio Orellana Rojas ekzamenon de Cseh-seminario 'B' kaj kurson kaj ekzamenon de Cseh-seminario 'C'. En 'B' ekzameno sukcesis Xose Conde kaj en 'C' ekzameno por diplomiĝi kiel Cseh-instruisto sukcesis Ruben F. Asensio kaj Natalja Kasymova.



La ĉiĉerono gvidas nin al la Sankta Eufemija en Rovinjo

Okazis 5 sesioj pri projekto Interkulturo plus 3 sesioj de laborgrupoj (Maŭro la Torre/Radojica Petroviĉ), 2 sesioj pri porinstruista trejnado kaj ekzamenado (Stefan MacGill) inkluzive prezenton de la propono por nova regularo – Ekzameno de Instru-kapablo de Esperanto de UEA/ILEI, 1 sesio pri ekzamenado ĝenerala (Bill Maxey, sekretario de IEK), du sesioj pri universitata agado (Johano Negrete, Ilona Koutny, Radojica Petroviĉ). Krome afable prelegis laŭvice Ron Glossop 'Pri nova Epoko' – tutmondismo, Hector Jimenez pri 'instruado de kulturo', Juan Ramon Rodrigues Gomez pri 'Instruado/Informado por naskigi e-istojn: personaj spertoj', Irina Gončarova – 'Faru la Rondon' – propraj spertoj pri instruado al universitataj studentoj. Espereble ĉiu prelego de la serio aperos en sekvaj numeroj de IPR.

Kompreneble dum la semajno restis ankaŭ sufiĉe da tempo por amuziĝi kaj por distraĵoj sen eskapi la proponatan programon! La vojaĝo mem aŭtobuse de Zagrebo al Lovran bonege montris la belan pejzaĝon de norda Kroatio, kampara kaj montara kiun ni poste pli intime vizitadis dum ekskursoj al la mezepokaj vilaĝoj, Mošćenicka kaj sur la unika duoninsulo Istria, Robinji. Antaŭ ol ekskursi Vjekoslav Morankiĉ, la prezidanto de la loka esperantista klubo de Rijeka, komitatano de UEA bonege klarigis la tumulteman historion kaj sekvan interesan lingvodiversecon de la regiono Kvarner. La pinto de niaj ekskursoj eble estis sperti la uzadon de Esperanto en ege taŭga profesia medio, nome kiel lingvo de oficiala ĉiĉeronado: Marĉelo Trampuh ne nur regalis per entuziasma rakontado pri la historio de la regiono sed eĉ invitis nin ĉiujn al sia propra farmbieno por gustumi sian vinon kaj la frandaĵojn de sia edzino; panon, fromaĝon kaj olivojn. Ĝi estis vera interkultura travivaĵo kaj interŝanĝo, ĉar kontraŭ grandanima donaco de botelo da vino ĉiu inter ni estas aparte petita sendi el sia hejmlando subskribitan bildkarton. Espereble Marĉelo ricevos amason por krei buntan internacian varbilon.

Por helpi al niaj kolegoj partopreni estontajn konferencojn, ĉiam gravas replenigi la monkofron. Tiucele, nia kasisto, Boo Mee Kim-Lindblom afable kaj tre lerte planis kaj gvidis vortludon 'Bingo' kaj finfine dum la lasta vespero ni sukcesis starigi la kutiman 'tombola loterion' al kiu multaj partoprenantoj kontribuis ne nur aĉetante biletojn po 2 kunaĵoj sed ankaŭ grandanime per donacetoj tre diversaj. La rezulto estas bona rikolto por la koleghelpa kaso de 70 EUR.

La komitato kun kvorumo efike kunlaboris por elekti novan estraron, Prezidanto Maŭro la Torre – rilatoj kun UEA, AIS, IEI, vic-prezidanto Stefan MacGill – eldonado, sekretariino Ageta Emanuelsson – membraro

kaj komitato, kasisto Boo Mee Kim-Lindblom, kaj estraranoj Jennifer Bishop – konferencoj kaj rilatoj kun FIPLV (Federation Internationale des Professeurs de Langues Vivantes), Radojica Petroviĉ kaj Sabine Trenner – lerneja agado. La komitato ankaŭ unuanime akceptis novan sektion, Esperanto-Ligon de Kroatio, vortumis rezolucion por traduki kaj publikigi ĝin tutmonde en gazetoj kaj akceptis unuanime la decidon de la estraro okazigi la 36-an ILEI-Konferencon 29/07-02/08/02 en Cumbuco, apud Fortaleza, loko de 87-a UK, Brazilo.

Aliajn rezultojn de nia laboro rakontos aparte kaj pli detale miaj kolegoj sed plej grave al mi estis krei amikan kaj kunlaboreman etoson kiun ni povos daŭrigi dum la sekvanta trijara deĵorperiodo.

Jennifer Bishop, estrarano pri konferencoj

Rezolucio de la 35-a Konferenco de ILEI

La 35-a ILEI-Konferenco, **sesiinte** en Lovran, Kroatio, de la 28-a de junio ĝis la 4-a de aŭgusto 2001, pri la temo "Dialogo al plifortigo de Esperanto-instruado kaj interkultura edukado",

Rimarkinte la gravecon de la konferencoj por plia evoluo de la instruagado kiel kontribuo al la celoj de internaciaj organizaĵoj kiel Unesko,

Konsiderante ke la ĝenerala temo de la konferenco plene kongruas kun la streboj de ILEI pruvi la utilecon de Esperanto kiel interkultura vehiklo,

Atentigas, ke Esperanto estas efika perilo al dialogo kaj interkultura edukado garantianta reciproke respekton al lingvaj rajtoj.

Sekve

La Konferenco invitas la landajn sekciojn de ILEI, landajn asociojn de UEA kaj TEJO-sekciojn, kunlabori por plua efektivigo de la celoj plifortigi la instruon kaj edukan agadon per la diversaj edukaj projektoj lige al Unesko kaj aliaj kulturklerigaj organizaĵoj¹.

¹ Komento por interna uzo de ILEI: La Konferenco alvokas la instruantojn de Esperanto levi sian agadon al profesieca nivelo partoprenante en trejnaj kursoj kaj ekzamenoj.

Raporto pri financa rezulto de la 35-a KF

La nombro de partoprenantoj estis 57. Ili parte pagis al nia konto ĉe UEA, plej parte dum UK kaj surloke. Sed pluraj estis kelktagaj partoprenantoj. Nur duono de la partoprenantoj ĉeestis komplete.

Por la Tuttaga Ekskurso ni devis redoni lunĉ-koston, pro neatendita malakordiĝo surloke. Tamen iom pli ol duono de la partoprenantoj donacis la sumon al diversaj fondusoj de ILEI. Dankon al la donacintoj!

La enspezoj estis 12952 EUR, elspezoj 11814 EUR tiel la resto (profito) fariĝis 1138 EUR. Krome la Tombolo kaj E-bingo donis kune 78 EUR.

Dum UK kaj KF multaj pagis membrokotojn: 28 membroj kaj 4 sekcioj. Itala sekcio pagis por la jaro 2002, unu pagis por dumviva membreco, kaj 17 novaj membroj venis.

Boomee

Dankanonco por donacintoj al diversaj fondusoj.

Mila van der Horst(NL), Johan Bachrich(VZ), G. Pirlot (BE), Paul J. Desailly(AU), Franziska Reisel(DE), NGGE(NL), Ronald Glossop(US), Jennifer Bishop(AU), Stefan M.(HU), Luisa O. Madela(IT), Niza Kutierman(NL), Mauro La Torre(IT), Lawrence Mee(GB), Gian Piero Savio(IL), Atilio O. Rojas(NL), Ewa Bondar(PL), Marie-France(FR), Roland L.(SE), Boo Mee K-L(SE), Maritza G.(KU), Hector J.(KU), Juan Ramon R.(KU), Johano Negrete(VZ), Agneta Emanuelsson(SE), Max Wearing(AU), Ana Montesinos(ES), Maria J. (CR), Agnes G.(BE), Giorgio B.(IT), Marisa B.(IT)

Koran dankon!


Boomee

Personaj impresoj pri la 35a Konferenco en Lovran

De la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 57 partoprenantoj el 20 landoj (ankaŭ pli da estraranoj ol en Bouresse) "dialogis al plifortigo de E-instruado kaj interkultura edukado" aŭ ripozis sunume kaj marbaniĝe, vizitis la vilaĝajn butikojn kaj konsumejojn, promenis laŭborde ĝis Opatija. Duontaga ekskurso kondukis al la malnova kaj (753 ŝtupojn) alta Mošenice kun bela preĝejo kaj interesa olepremilo; tuttaga tra Istrio kaj al vitoj kaj vinoj.

La hotelan aŭ lernejan prizorgon oni aplaŭdis. Same la organizinton Viŝnja Brankoviĉ kaj la gvidintajn estraranojn. Sola malhelpo estis la troa varmo kaj manko de klimatizo. La kunvenejoj memorigis pri meritaj kroataj pedagogoj: Karolo Muĥa (instruis i.a. al blinduloj), Bojidar Vanĉik (verkis lernolibron) kaj Zorka Zukiĉ (enkondukis Esperanton en lernejon).

Salutmesaĝis la nova eduka estrarano de UEA Gbego Koffi, substrekante la gravecon de instruado, ja meza inter la trio informado, edukado kaj aplikado laŭ la nova Laborplano 2001–2010. Fine UEA ankaŭ buĝetis sumon tiucele: 6000 eŭrojn, tamen ne nepre por ILEI, sed ja por taŭge difinitaj projektoj. (Por instru-financado jam longe pledis Stefan MacGill, kiu nun retrovis multajn siajn proponojn en tiu Laborplano.) Tre grandformata saluto el Jules-Verstraeten-lernejo en Benino ellogis resaluton kun desegno de Karina MacGill. Kaj feliĉe la laborplanan junigon de la movado krom familio MacGill montris ankaŭ partoprenantoj al Cseh-seminario C, eĉ la nova ILEI-estraro. Kaj ĉu forgesi la skeĉojn de la du lernantinoj de Marija Beloŝeviĉ?



Johano Bachrich, nia venezuela reprezentanto, kiel gajninto de tombolo

La komitato de UEA akceptis daŭrigi la projekton Interkulturo, tamen kun nova enhavo, sciigis R. Petroviĉ, mem verkanta raporton de la unua jarduo. El la Laborplano por ni gravas la celo "profesiigo", tial la konferenco krom "Interkulturo" kaj aliaj projektoj, tre atentis instrutrejnadon kaj universitatajn kursojn, esplorojn kaj studadon interlingvistikan-esperantologian. Salajretojn perlaboros merkato kaj ekspedisto de "Juna Amiko", sed dezirinda restas ĝenerala administranto kiu asistu la sekretarion, ekz. por akiri subvenciojn.

Granda malhelpo por ILEI estis ĝuste la manko de sekretario: perdiĝis la kontakto kun Landaj Sekcioj koste de 200 kotizpagoj kaj pluraj malhavis informojn (en la dua numero de IPR, ne ĉie liverita). Tiom pli ĝojigas ke la estraron eblis kompletigi – ja la komitato havis kvorumon: 15 voĉojn – ĝis sepopo kun sekretario Agneta Emanuelsson, fakuloj Radojica Petroviĉ pri universitatoj, kaj pri trejnado kaj junularo Sabine Trenner. Por ne ĉiujare okupiĝi pri estrarektado la komitato jam en Bouresse decidis reiri al trijara elekto de la tuta estraro: la komisiono pri regularo reviziu la Regularon antaŭ la konferenco en 2002.

(Re)varbado por ILEI okazis en Francio, Italio kaj danke al Boo Mee Kim-Lindblom en Koreio. Ŝancoj estas en Japanio kaj Brazilo. Tial la buĝeto antaŭvidas 10 %-an kotizokreskon.

Admirinda estas la eldona agado: En tempa manko Stefano MacGill tamen povas liveri fotokopiojn de Gvidiloj ĉe "Okulo" kaj "Tendaraj Tagoj", dua kajero. Lin ĉefe okupas la lastaj ekzercaroj ĉe la videokurso "Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo" kaj komputila kurso. Li montris ankaŭ specimenojn de tre eldoninda brazila kurso surprize inspira kaj multpaĝa.

Kaj ni povis bonvenigi novan sekcion, la instruan fakon de Kroatia Esperanto-Ligo, apud tiu de Marija Beloŝeviĉ.

Gajno estas certe ankaŭ la kunlaboro kun FIPLV, internacia fremdlingva instruista asocio, laŭ pledo de Nel Overwater: okupiĝos Jennifer Bishop kaj Kep Enderby. Plifortiĝos do la kunlaboro kun UEA. Sed krome ties kontinentaj (landaraj) komisionoj helpu ĉe pluraj projektoj, ekz. kunlabore kun TEJO sendi instruistojn al landoj kie ili mankas, t.e. la projekto "flugiloj de facila vento", kaj en organizo de trejnaj seminarioj.

Simile nia rezolucio, vortigita de Maritza Gutierrez, volas kunlaborigi ILEI, UEA kaj TEJO apoge al la diversaj edukaj projektoj ligitaj kun Unesko k.s. organizadoj.

La komitato de UEA akceptis – kun ŝanĝoj – la regularon por instru-ekzameno. Ja gravas trovi kunlaboron kun ŝtata universitato por ke la diplomo havu statuson: eble en Szombathely kaj Rio de Janeiro. Pri adapti

de la Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI ni aŭdis planojn de la sekretario Bill Maxey, ekz. apartigi la kulturajn sciojn disde la lingva ekzameno. Pri la instrua ekzameno ni ricevis planon kiu antaŭvidas centran gvidanton asistatan de grupo da "tutoroj" akompanantaj la kandidatojn.


[*Dekstre: nia ĉiĉerono Marĉelo, MacGill kun la tria filino kaj A. Emanuelsson en Rovinj →*]

Kuraĝa decido en Brazilo estis invito por nia Konferenco 2002, eble al Cumbuco ĉe Fortaleza (28 jul. – 3 aŭg.): sondo inter niaj konferencanoj montris kontentigan interesiĝon. Stefan MacGill trovis en Brazilo ardan entuziasmon kaj emon fondi novan sekcion de ILEI. Ĝuste ili bezonas kontaktojn. La temo rilatu lingvan ekologion, laŭ propono de Maŭro la Torre. Sed multan atenton havu ankaŭ instru-trejnadon kun diversaj metodoj. Por 2003 ni havos elekton inter svedaj Karlskoga kaj Lesjöfors.

Atilio Orellana Rojas, ofte okupita de la Cseh-seminario C, paralela kun aliaj okazaĵoj – sukcesis duone Xosé Conde, bone Ruben Fernández, tre bone Nataŝa Kasymova –, pledis por alia sezono de niaj konferencoj, ekz. aprilo. La ideon adapti la temon al la ebloj de junuloj, la komitato ja transprenis: antaŭ la IJK 2004?

NGGE (la nederlanda LS) alvokis aliajn LS ĝemeliĝi kun tiuj LS al kiuj mankas rimedoj, kiel NGGE ĵus interkonsentis kun la kuba LS. Simile Svedio kunlaboras kun Tanzanio, kaj multaj ĝemelaj rilatoj apogas "Interkulturon". GEE (Francio) pledis plu okupiĝi pri la Manifesto 2000, kunlabore kun Unesko-komisionoj. Krom la dulingva teksto GEE faris afiŝaron por informado ĉe mezgradaj lernejoj.

Grandan sukceson havis Aurora Bute en "Euroscola", lerte kunforĝante lernantojn el ses lernejoj en unu klason, kiu fine de la kurso partoprenis en



la junulara Eŭropa Parlamento en Strasburgo. Ŝi mem devis zorgi pri sufiĉaj financoj. Malsukcesis kuna provo de UEA kaj ILEI akiri financojn de EU, manke de homfortoj.

Memsperton de grupodinamiko havigis Sabine Trenner per interkona ludo. Por solvi la eternan problemon kunteni grupon (kursanojn) estas esence ilin aktivigi komune. Apartan atenton ni dediĉu al adoleskantoj post la IIK-aĝo, tro junaj por TEJO. Pluraj pledis reokazigi la gimnazion, kiel "lernejon Zsuzsa Barcsay" laŭ propono de SMG, honore al la tre merita iniciatinto/gvidinto. (Ĉi-jare ni ne nomumis novajn Honorajn Membrojn.) Plej efikas instrui al studentoj pri pedagogio, rimarkigis Jennifer Bishop (En aŭstralia Viktorio fiaskis la bazlerneja fremdlingva instruado: ŝanco por Esperanto.).

Multan atenton ni dediĉis al la daŭrigo de "Interkulturo", al kiu aliĝu ankaŭ nelemeraj grupoj kaj eĉ individuoj; por aliĝokondiĉoj, internaciaj renkontiĝoj k.s. "ideumis" 6 laborgrupoj. Ĝi listigu ankaŭ ĉiujn instruantojn, eĉ -ontojn. Ĉar la ekstera mondo scias preskaŭ neniom pri Esperanto – la ĉi-fojan maleblon kontakti eksterulojn kaŭzis la elĉerpiĝo de kroataj kolegoj post la energiraba UK-servado, escepte de Viŝnja Brankoviĉ – estu i.a. informdosiero pri instruado en interreto, rekomendis Juan Bachrich. Klare la usona diskutlisto meritas pli da konateco: IPR havu rubrikon pri trejnado laŭlande. (Enketon pri diversspecaj trejnadaj anoncis por septembro Sabine Trenner.)

Kunlabore kun ESF kaj TEJO kompiliĝas katalogo de lerniloj: respondecas Katalin Kováts (n.s. Smidéliusz); poste en turisma lernejo ni povis interrete viziti la virtualan lernejon Tibor Sekelj, en kies biblioteko ni admiris la jamajn registrojn pri pluraj gravaj lernolibroj (amplekso, celo ... Ni petis aldoni kiomon da disponeblaj ekzempleroj por nepagipovaj klasoj aŭ grupoj.)

Ceteraj projektoj kaj agadoj: "Infanoj ĉirkaŭ la mondo" de Charlotte Kohrs transprenis Ron Glossop; "Indiĝenaj dialogoj" engaĝis interalie Atilion; "Lingvaj festivaloj" bone enirus ĉe "Interkulturo", laŭ propono el TEJO. En "Euroscola" aktivis novaj klasoj.

En tre interesa prelego Petroviĉ montris ke ĉe instruplanoj kaj programoj ni atentu ne nur la instruanton sed ankaŭ la interagadon kun la lernanto; instruprogramoj enhavu la tri dimensiojn amplekso, profundeco kaj sinsekvo. Kvankam iu opiniis la sinsekvon de la materialoj ne esenca, la instrua sperto ja montris ke serblingvanoj dekomence uzu prepozitivojn, ĉar la akuzativo ja estas konata fenomeno. Li atentigas ankaŭ pri la uzado

de poezio, kaj pri kulturaj diferencoj: La Cseh-metodo ne sukcesis inter japanaj kursanoj. Ĉu unuecigi laborplanojn tutmonde? La partoprenantojn li surprizis taskante liveri la cent PLEJ gravajn morfemojn por komenca kurso; amuze ke mi forgesis ĝuste "pli" kaj "plej".

Ronald Glossop varme pledis por Mondfederismo (ĵus aperis lia tiutema libro en Esperanto!), skizante la evoluon al internacia kunlaboro. Tamen UN atingas nur konfederacion de sinservantaj nacioj, dum nia mondo por postvivo bezonas demokratian federacion. Nia tasko: instrui al la junuloj ke ili unualoke estas membroj de la tuttera komunumo. Esperanto do estu "tutgloba" anstataŭ "internacia" lingvo.

Tre interesis prelegoj pri instruado kaj informado (Juan Rodriguez), instruado kaj kulturo (Hector Jiménez) en Kubo, universitataj spertoj en Venezuelo de Johano Negrete, en Hungario kaj Pollando de Ilona Koutny, kies interlingvistika kurso evidente meritas plian partoprenon, ĉiuj plentekste publikigindaj. Eble la plej spritan metodon "FARO" (faru la rondon) por junuloj (kiuj mem varbas kaj apogas novajn kursanojn) prezentis Irina Gonĉarova, kiu cetere por siaj universitataj kursoj mem verkis lernolibron. Ĝenerale ni sentis bezonon pri pli da interaj kontaktoj ankaŭ dum la jaro. Kaj eble mi ofertu antologieton de niaj (ankaŭ miaj) lingvaj eraroj.

Rob Moerbeek


Niaj novaj estraranoj

Agneta Emanuelsson

Instruistino pri matematiko, fiziko, ktp. Studis en svedaj universitatoj dum multaj jaroj, ekde 1960 ĝis nun kaj ankoraŭ

Laboris en sveda eldonejo, Almqvist & Wiksell, en Stokholmo. Estis redaktorino kaj gvidis diversajn projektojn.

Memlernanto. Komencis lerni Esperanton en 1987. Fondis klubon en Katrinholm en 1987. Unua prezidanto, 1987- Estrarano de SEF, (Sveda Esp. Federacio) dum



kelkaj jaroj; estrarano de Eldona fako de la Sveda Esp. Eldonejo dum kelkaj jaroj; kaj ankoraŭ nun revizoro de la sveda sekcio de ILEI kaj sveda komitatano ekde multaj jaroj.

Membro de la Elekta Komisiono 1997-2000. Prezidis la komitatkunsidojn dum la konferenco en Kvinpetalo 2000.


Komitatano A por Svedio dum kvar jaroj; membro de la ekzamena teamo dum la tutamerika kongreso en Meksikio kaj ankaŭ dum la Zagreba UK 2001; estas rajtigita dum ankoraŭ tri jaroj.

Organizis la Svedan Jubilean Kongreson en 1996.

Ekzamenoj; Elementa 1989, Meza 1992, Sveda 1988, Interlingvistikaj studoj en Poznan dum du jaroj...

Skribis libreton pri la unua Sveda Prezidanto, Valdemar Langlet, 1999, kaj prezentis ĝin dum verkista duonhora en Tel-Avivo dum UK 2000.

Partoprenis multajn landajn, regionajn kaj internaciajn kongresojn. Prezidanto de la loka Unuiĝinta Nacio Asocio.



Radojica Petrović

Naskiĝis en la jaro 1949, en Serbio-Jugoslavio, esperantiĝis en 1966, diplomiĝis pri matematiko, magistriĝis pri maktuaria matematiko kaj profesie orientiĝis al informadiko. Nun havas postenon en la Teknika Fakultato en Ĉaĉak okupiĝante pri informadikaj studobjektoj inkluzive metodikon de prikomputila kaj perkomputila instruado.

Ekde la jaro 1967 instruis en lernejoj kaj publikaj E-kursoj, en 1974 publikigis 12-lecionan kurson en la Jugoslavia gazeto por element-lernejanoj "Infana Gazeto", ekde 1997 instruis en metodikaj seminarioj kaj daŭrigaj

kursoj en Somera Esperanto-Lernejo en Tesliĉ, Respubliko Serba en Bosnio-Hercegovino, nun gvidas klason de Interkulturo en Ĉaĉak.

En Esperanto-Instituto Beograd kunordigas realigadon de la projekto Interkulturo en Jugoslavio kaj preparojn de Antologio de Esperantaj noveloj tradukitaj serben.

En julio 2000 organizis Internacian seminarion Interkulturo, Ĉaĉak, Jugoslavio, kaj gvidis Internacian Lernejon "Interkulturo" en Kopaonik, Jugoslavio, kiun financis la Ministerio por Junularo kaj Sporto de Serbio. Li konsideras ke la Esperanto-komunumo devas pli integriĝi en sian socialan medion por tie pruvi sian valoron kaj de tie ĉerpi rimedojn por siaj agado, pluvivo kaj plivastiĝo.

Sabine Trenner

Nask.: 1962-11-30 en Staaken (orienta Germanio).

1986 diplomiĝo kiel inĝeniero pri maŝinkonstruado.


1997 diplomiĝo kiel socialpedagogo. Specialiĝis pri mediaciado, perado en konfliktoj, agado kontraŭ perforto.

1998 Trejnisto pri interkultura edukado, libera docento pri politika klerigado.

Laboras ekde 09/2001 kiel socialpedagogo en lernejo.

Esperantiĝis en 1985.

Aktivas ekde 1986 kadre de Kulturligo de GDR en GDREA, junulara fako.



1992 – 1996 profesie ĉe E-Junularo Brandenburgio/ Berlino, respondecis i.a. pri klerigaj projektoj kaj infanaj kaj junularaj programoj, lanĉis i. a. CSEII-instruistan lernadon por gejunuloj el Pollando kaj Germanio, gvidis konsilejon pri junularaj interŝanĝaj kaj socialaj projektoj kun Orienteŭropo.

Ekde 1995 kleriga servo SURVOJE (kun Elisabeth Schwarzer); seminarioj pri konflikta prilaboro, interkultura lernado, teama laboro k.s.

Ekde 1996 mentoro kadre de reta-koresponda kurso de GEJ.
1998 diplomigo kiel CSEH-instruisto (ekde tiam kursoj en diversaj eŭropaj landoj).
1999 respondecis pri IIK en Berlino.
Ekde 2001 membro de ekzamena komisiono de ILEI.

Grava anonco!

Lastatempe pluraj plendoj kaj kritikoj venis al la estaro de ILEI kaj redaktejo de IPR pri tio, ke pluraj individuoj malregule ricevadas IPR, aŭ ekzemple tute ne ricevis la ĉi-jaran 2an numeron. Post la esplorado de la problemoj ni konstatis ke la problemojn kaŭzis pluraj faktoroj; ĉefe distribuaj problemoj ie inter la eldonejo ĝis la laŭlandaj sekcioj, manko de ILEI sekretario, ktp.

En la estonteco ni maksimume provas kontrol(ig)i la dissendadon, eviti ĉiujn problemojn por pli bone kaj pli rapide servi nian membraron. Ni aparte petas tiujn membrojn, kiuj ne ricevis la ĉi-jaran 2an numeron, ke ili kontaktu la novan sekretariinon de ILEI, Agneta Emanuelsson (adreso sur la 2-a kovrilpaĝo) kaj anoncu sian problemon. Esperante ke la situacio pliboniĝos kun pardonpeto salutas vin:

la estaro kaj la redaktoroj.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeulenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETHI József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: jozefo@nl-papa.hu; jozefo_nemeth@hotmail.com, tel: +36-89/ 356-050. Laboreja fakso (ĝi funkcias nur en lernotagoj, antaŭtagmeze): +36-89/ 324-896). La familia stato kaj loĝloko de nia vic-redaktorino ŝanĝiĝis: bv. uzi nur la retadreson katalin@ikso.net! La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leg-handikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk. La nunan numeron ni sendis al la presejo la 24-an de septembro, redaktfino por la sekva numero: la 31-a de oktobro 2001.

Aligilo por la 36-a ILEI-Konferenco

28.07 – 03.08.2002, Cumbuco, Brazilo

(Bonvolu skribi pres-stile. Valuto en EUR.)

Familia nomo _____
Persona nomo _____

Naskiĝdato: / / (tago/monato/jaro) Sekso: viro/-ino

Profesio _____ Hobio _____

Adreso _____

Poŝtkodo _____ Urbo _____

Lando _____ Tel: _____

Fakso: _____ Retadreso: _____

Mi pagas konferenc-kotizon _____ EUR

Mi komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn en tiu ĉi aligilo.

Subskribo: _____

Dato: _____ (en la sama ordo kiel supre)

Aliĝkotizo _____ EUR

Donacoj al

ILEI _____ EUR

Infankongresa kaso _____ EUR

Eldona kaso _____ EUR

Dazzini kaso _____ EUR

Koleghelpa kaso _____ EUR

Interkulturo _____ EUR

Bankkostoj _____ EUR

Sume _____ EUR

* Pagmanieroj:

a) al ILEI-konto ilek-a ĉe UEA (bonvolu sendi al la Kasisto de ILEI la kopion de via pago)

b) al postĝirkonto 682117-7, Stokholmo, S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS, ILEI c/o Boo Mee Kim-Lindblom, Kasisto, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio.

- * Bonvolu aldoni 6 EUR por bankkostoj.
- * Bonvolu nepre sendi la subskribitan aliĝilon kun pago al la Kasisto de ILEI.

Aliĝkotizoj por la 36-a ILEI-Konferenco en Cumbuco, Brazilo:

A- kaj B-landoj same kiel ĉe UEA. La prezoj estas indikitaj en EUR.
La kotizo ne inkluzivas loĝadon, manĝon kaj ekskurson.

	ĝis 02-01-31	ĝis 02-04-30	ekde 02-05-01
Kategorio	A / B	A / B	A / B
1. ILEI-ano	30 / 20	40 / 30	50 / 35
2. Ne ILEI-ano	40 / 25	50 / 35	55 / 40
3. Junulo, handikapulo	20 / 15	30 / 25	40 / 35

Loĝado, manĝado

Hotelĉambroj (po unu persono, unu nokto)

- 2-lita kun matenmanĝo _____ 30 EUR (a)
 duonpensiono _____ 32 EUR (b)
 plenpensiono _____ 38 EUR (c)
 1-lita kun matenmanĝo _____ 42 EUR (ĉ)
 duonpensiono _____ 45 EUR (d)
 plenpensiono _____ 50 EUR (e)

Lerneja loĝejo

- 4-6-lita plenpensiono _____ 19 EUR (f)

Mi mendas loĝadon en kategorio..... ekde la..... de julio ĝis la..... de aŭgusto.

Mi deziras loĝi kun _____ (nomo kaj lando).

Mi estas vegetarano: jes (), ne ().

Tuttaga ekskurso kun lunĉo _____ 40 EUR (g)

Mi mendas tuttagan ekskurson: jes (), ne ().

Transporto de Zagrebo al Lovran _____ 20 EUR (ĝ)

Mi mendas la transporton: jes (), ne ().

Seminarioj

Mi aliĝas al la Cseh-seminario: jes (), ne ().

(Se AIS-prelego okazos, IPR 1/01 informos pri tio.)

Mi pagas al _____ en sumo _____ EUR.

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: bmaxey@visi.net

Elekta: Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

Kontrolo: Bertil Andreasson, Lars Forsman, Bo Sandelin

Lerneja: Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen

Terminara: Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

FIPLV (*Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj*)

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

UEA: *Universala Esperanto-Asocio*, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Maŭro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbeglo Koffi**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verte, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60;

Mircille Grosjean, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+ fakso (+41 32) 932 18 88, <grosjean9@caramail.com>

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064. La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>, postĝirkonto: 682117-7 Stokholmo, S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS*. Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: *UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64*. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 39 de Jarlibro 2001. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

Interreto

<http://ips.uniroma3.it/ilei> *Bazaj informoj pri ILEI kun ligoj al aliaj paĝoj*

<http://ips.uniroma3.it/eins> *La diskutejo E-INS pri Esperanto-instruado*

<http://ips.uniroma3.it/eler> *Tabelo de Esperanto en lernejoj (E-LERnejoj)*

<http://ips.uniroma3.it/kler> *Kvazaiternejo "Tibor Sekelj" por la Projekto Interkulturo.*

<http://esperanto.nu/ileibulteno/index.html> *ILEI-Bulteno*

www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto *Juna Amiko*

www.hungary.net/esperanto/tend-tag.htm *Tendaraj Tagoj (angla priskribo)*

www.nl-papa.hu/ipr/ *Internacia Pedagogia Revuo*

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Mucu, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana
✉: selimib@albamail.com

Argentino: Teresita Alaniz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

Aŭstralio: Kay Andersen, P.O. Box 186, Moorooka AU-4105
✉: kjand@ozemail.com.au

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

✉: raymond.wylleman@pi.be

Brazilio: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Malcolm Jones, 1 Regent Avenue, Skipton, GB-North Yorkshire BD23 1AZ

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratiškovice 938
✉: mmelicharek@iol.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
✉: zdchen@public.wh.hb.cn

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito
✉: cantskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,
✉: josepf.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 lhász
✉: jozefo@nl-papa.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran
✉: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma
✉: vmadella@tin.it

Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001
✉: masumi-s@gw3.gateway.ne.jp

Katalunio: Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus
✉: ileicat@hotmail.com

Kroatio/KEL: Anka Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb,
✉: ankica.jagnjic@zg.tel.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana

✉: kubesp@ip.etecsa.cu

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,
✉: iei001@worldonline.nl

Norvegio: Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad
✉: bthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap. 7, RO-1900 Timisoara

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
✉: mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
✉: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Svislando: François Randin, Str. Vallombreuse 11, CH-1004 Lausanne
✉: francisko@courrier.com

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO,
✉: esp.togo@cafe.tg

Usono: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US)
✉: 72644.2450@compuserve.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenovič, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima Región
✉: strigo@cicreuna.cl

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 94, EE-3053 Keila

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Norðurbraut 33, l.h., IS-220 Hafnarfjörður,
✉: loftur@skyrir.is

Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

Jugoslavio: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, YU-32000 Čačak
✉: radp@ptt.yu

Kongo: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaire)

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José
✉: miaumiau1@racsa.co.cr

Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do KR-499-900
✉: so@kns.kangnam.ac.kr

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-Wellington 1
✉: gwenda.s@ihug.co.nz

Portugaliao: João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - r/c esq Vale Grande, PT-1675 Pontinha

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.
✉: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taškent, CIS
✉: eugeny@esper.gimli.com

Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado VE-70782, Caracas 1071 A